DIA REGNO
ISSN 0167-9554

# DIA REGNO

• dumonata kristana revuo en esperanto • n-ro 4 (889) • 2011 •











# *Memore al Jacques Tuinder*

**KELI**
**Kristana Esperantista Ligo Internacia**
**fondita en 1911, neneŭtrala kunlaboranta kun UEA**

**Celo:** *Krei efikan kontakton inter kristanoj el diversaj landoj kaj per Esperanto diskonigi la Evangelion pri Jesuo Kristo.*

**Prezidanto**: Philippe COUSSON
✉ 26 rue de Pré-Ventenet,
FR 86340 Nouaillé-Maupertuis, Francio;
☎ +33 (0) 549468021;
💻 keli@chez.com

**Sekretario**: Pavel POLNICKÝ;
✉ Na Vinici 110/10,
CZ 290 01 Poděbrady II, Ĉeĥio
☎ +420 325 615 651; 💻 cea.polnicky@quick.cz

**Kasisto**: Ágnes RÁCZKEVY-EÖTVÖS
✉ Kláuzal utca 32,
HU 1072 Budapest, Hungario
☎ +36 12660 842;
💻 agnes@raczkevy-eotvos.com

**Kotizoj:** Rekta membro kun gazeto, minimume €20,- • Membro-subtenanto €30,- • Nura abono: pagante rekte al KELI €16,- • pagante al Libroservo €18,- • Sendoj de okcidentaj monbiletoj per registrita letero al la kasisto de KELI. • Se estas en via lando UEA-poŝtĝirkonto (informiĝu ĉe UEA) bonvolu prefere pagi al UEA por konto **kelk-p** de KELI • Franca bankkonto de KELI ĉe CIC-banko: BIC: CMCIFRPP; IBAN: FR76100 96182 48000 36874 80104

Vizitu ankaŭ la ttt-paĝon **www.chez.com/keli/**

---------------

DIA REGNO

**Oficiala organo de KELI, fondita en 1908**
**dumonata revuo - ISSN 0167-9554**

**Redaktoro**: Bengt Olof ÅRADSSON
✉ Västergårdsg 15; 256 64 Helsingborg; Svedio;
☎ +46 (70) 2004574; 💻 dr_boarad@yahoo.se

**Kontrollegis**: Éva FARKAS -TATÁR

Abonprezo sen membreco en KELI: €16,- aŭ egalvalora. Abonoj kaj anonckostoj pagotaj al la kasisto de KELI (vidu supre).

***Pri la enhavo de la artikoloj respondecas nur la aŭtoroj. Represo kaj traduko permesataj, kondiĉe ke oni citas la fonton. Specimenon kun represo aŭ traduko oni sendu al la redaktoro.***

**Ekspedado:** Pavel POLNICKÝ
Vidu la adreson de la sekretario

**Presado:** Tiskárna ASTROprint s.r.o., Poděbrady, Ĉeĥio
💻 info@astroprint.cz

**Eldonmonatoj:** meze de feb, apr, jun, sep, okt, dec

## REDAKTORAJ VORTOJ

Mankas la enhavtabelo, ĝi ĉi-foje ne estas necesa, ĉar tiu ĉi numero temas ĝis 95% pri Jacques Tuinder. Plurmaniere mi ricevis materialon, reagojn pri la forpaso de li kaj mi decidis ke la tuta numero estu dediĉita al li kaj lia laboro.

Unue vi trovas la reagojn pri lia forpaso. Poste mi publikigas artikolon, kiun Jacques prilaboris, kaj aliajn artikolojn, kiujn vi eble jam legis, sed donas bazan informon pri li kaj lia laboro.

Sur la fronta paĝo mi kunemtis kelkajn bildojn pri li. Vi vidas kiel Jacques helpas atentigi infanon dum mezurado en Rusio. Dum la misio tie li ankau ludis kaj bone fartis post la laboro. Vi vidas lin dum kongresoj kun la edzino Vera, kun Albrecht Kronenberger kaj kun Mats Landfors.

Persone al mi kaj al mia familio li multe mankos. Kun nekredeble granda ĝojo ni ĉiam renkontis lin kaj Vera dum la kongresoj.

Mi, kiel redaktoro, ofte ricevis laŭdajn vortojn de li pri Dia Regno, precipe kiam mi plej multe bezonis tiujn apogajn vortojn en la komenco kiam mi tute freŝe ekredaktis nian gazeton. Krome, li faciligis mian laboron ĉar senlace kaj regule li sendis kontribuojn diverstemajn sed ĉiam interesajn. Kie li trovis siajn forton kaj energion?

Unu el la plej fortaj impresoj pri Jacques kiu restos en mia memoro, estas lia fervoro pri sia tasko helpi aliajn. Kaj pri tio li plenkore povis rakonti.

10.01.1933  18.06.2011



# Adiaŭo de Jacques TUINDER

La 21-an de julio mi ĉeestis la adiaŭan diservon de Jacques en Heemskerk kaj la kremacian ceremonion en la tombejo/kremaciejo de apuda vilaĝo. La preĝejo estis plenplena kaj la diservo estis ege kortuŝa. Inter la multaj funebrantoj estis Fratoj de la Abatejo en kiu li libervole laboris du tagojn semajne dum multaj jaroj. Vera kaj Jacques apartenas al la tiel nomata "kritikema baza komunumo kristana IJmond". En Nederlando ekestis multaj de tiaj ekleziaj komunumoj en la periodo de la granda ekumena vekiĝo. La plej multaj jam malaperis sed en Heemskerk ĝi estas vivanta.

La liturgio enhavis multajn kantojn de la verkisto de kantoj Huub Oosterhuis kies tekstoj estas fakte poemoj. Al multaj el niaj protestantaj eklezianoj ili ankaŭ estas konataj kaj ŝatataj. La ĥoro de la eklezio kantis kaj subtenis niajn voĉojn. La biblia legaĵo estis psalmo 36,8-10. Je la fino kantis la Fratoj de la Sankta Adelbertus Abatejo en la latina,"Danko-n kaj Beno-n".

Tra la tuta tago iris kiel ruĝa fadeno ankaŭ la aktivaĵoj de Jacques por la ne-necese blindaj kaj malbon-vidantaj homoj. Ofte estis menciita lia entuziasmo por Esperanto. La reprezentantoj de la multvariaj organizoj, al kiuj li kontribuis, substrekis lian ne-profitemon kaj kompaton. Pluraj esperantistoj, membroj de KELI, IKUE, Esperanto Nederland, UEA, reprezentis nian Esperanto-movadon. Nome de ĉiuj el ili parolis Gerrit Berveling. La ne-atendita forpaso de Jacques estas ankaŭ granda perdo por ne nur KELI kaj IKUE sed por la tuta esperantistaro.

*Els van Dijk*

# Rememoroj pri Jacques



Neniu malestimu vian junecon,
Sed vi estu ekzemplo al la kredantoj,
Per parolo, per konduto, per amo,
per fido, per ĉasteco.
I.Timoteo 4,12

Eble ĉi tiuj konsiloj kondukis la paŝojn de Jacques jam ekde juneco ĝis la morto. Kiuj konis lin, neniam povos forgesi lian kredon kaj parolon, lian ĉiam mildan konduton.

Antaŭ jaroj li respondis al la demando: Kiam mi estis la plej feliĉa en la vivo? – por la revuo Bazaro. Jen, lia respondo:

> *"La pejzaĝo de mia vivo ne multe malsimilas de la vivoj de aliaj: ĝin karakterizas montoj kaj valoj. Esplorante miajn konsciencon kaj vivrakonton, mi devas veni al la konkludo, ke ĉe mi "la feliĉo" ne estas daŭra stato. Sed certas ke ĉiam aliaj estas en la ludo, pli konkrete: la feliĉo de aliaj homoj. Mi parolu pri unu alta monto humanintence laborante en lando, kie la enloĝantoj devas ĉiutage vivi"en grizaj kaj nigraj valoj" de malriĉo kaj mizero…*
>
> *Kune kun amiko-optikisto Paŭlo, mi en 1995 por la unua fojo vizitis la lernejon por vidhandikapitaj infanoj en Tirano, la ĉefurbo de Albanio. Ni havis kun ni dekojn da nove faritaj okulvitroj por disdoni al same multaj dormoĉambroj por bonan-nokti la infanojn, el kiuj multaj enlitiĝis kun la ĵus akiritaj okulvitroj sur la nazo. Ili admiris la plafonon, kiun ili antaŭe neniam tiom bone estis vidintaj. Kaj aŭdinte niajn voĉojn, ili etendis la braketojn por silente kaj dankesprime meti al ni ĉirkaŭ la nukon. Ilia feliĉo faris min profunde feliĉa!"*
>
> Jacques Tuinder

Li estas kaj restas en nia koro tiu neforgesebla, ekzemplodona Amiko, kiu konstante radias lumon por la homaro, kiel eterna-meĉo!

Ripozu en paco, Bona Animo!

*'Sigmond Júlia*

# Memorante Jacques Tuinder kiel kursanon de la Lerno-domo en Heemskerk



Pli ol 45 jaroj Jacques Tuinder estas konata kiel batalanto kontraŭ blindeco kaj malbona videco.

Sed Jacques sciis, ke li mem riskis blindecon aŭ malbonan videcon malgraŭ sia batalemo aŭ eĉ esti blindiĝanta kaj por preventi tion, li ĉeestis la kunvenojn en la Lerno-domo Kennemerland dum 40 jaroj. Estis voĉo en lia orelo por veki lin, lampo antaŭ liaj piedoj por montri al li la bonan vojon, serena rakonto kaj ĝojiganta mesaĝo, fonto de lumo por ke li vivu.



Jacques dum misio en Rusio kun Viktor Gromov kaj Mila Hodusova

Li marŝis dum sia 38a jaro ĝis sia 78a jaro malantaŭ Moseo, malantaŭ Torao, la fingroj ĉe la teksto, 40 jarojn dezerto, 40 jarojn eliro, trairo eble, kiu scias?

Sed antaŭ ol mi predikos, unu kursano memorigis min pri la rava humoro de Jacques. Li povis paroli pri Dia Moŝto kvazaŭ li ĵus trinkis kafon kun Li. Tial ian relativecan rakonteton pri tio.

Ne mirige, konante Jacques, ke survoje al la ĉielpordego li ne trafis Petron, sed Dian Moŝton mem, kiu atendis lin kun etenditaj brakoj. Sed en mallonga distanco li haltis kaj demandis al Dia Moŝto: ĉu nia filo Barto jam eniris, ĉar se ne, mi ne povas eniri.

***Kompreneble kara Jacques, kiel vi povus dubi pri tio. Mi bone povas imagi, ke vi ambaŭ havos multe por rakonti, eniru!***

Sed, Dia Moŝto, pardonu min, kiu mi estas sen Vera, miaj infanoj kaj genepoj? Ĉu tiuj poste estas permesataj eniri?

***Kompreneble karulo. Ili ĉiuj estas iomete infektitaj per la viruso, kiu ege infektis vin. Ili estas korege bonvenaj!***

Jes, sed, Dia Moŝto, sed kiu mi estus sen tiuj ĉiuj centoj, jes miloj da gedonacintoj, tiuj ĉiuj bonfarintoj de Zienderogen, Ĉu tiuj ankaŭ estas




Jacques dum misio en Rusio

permesataj sidi al via tablo?

***Kompreneble Jacques, mi kreis la homon el la ŝlimo de la tero kaj se vi povis fari bonajn aĵojn, bonege, ili estas kore bonvenaj.***

Kaj jen, kiam mi estas demandanta, Dia Moŝto, ĉu tiuj miloj da homoj, kiujn ni helpis per okulvitroj, per brajlaj maŝinoj, per kompletaj lernejoj por blinduloj kaj per tre multaj paketoj kun kajeroj, blindulaj bastonoj, ludiloj, krajonoj, kaj plumoj, ĉiuj el tiu "dia donaco"de la Reuza Butiko? Ĉu tiujn vi ne lasas stari ekstere?

***Vi scias, Jacques, ke vi lernis en la Lerno-domo: Tio, kion vi faris al la plej malaltaj de mi, vi faris tion al mi. Lasu eniri ĉiujn!***

Mi estas ege danka, ke ni entute povis fari ĉi tion, Dia Moŝto, sed la laboro ankoraŭ ne estas finita. Kion ni faru kun ĉiuj tiuj milionoj, kiujn ankoraŭ ni ne povis helpi?

***Mi solvos, Jacques, vi povis lerni de mia popolo: Tiu, kiu savas unu homon, savas tutan mondon!***

***Sed fine envenu, vi malvarmiĝos!***

Jes, sed Dia Moŝto, ankoraŭ unu demandeto: (Tiel li ofte faris regule en la Lerno-domo, pensante, ke oni bone eksplikus, Jacques faris ankoraŭ unu demandeton). Dia Moŝto, estas ankoraŭ miloj, eble milionoj da homoj, kiuj neniam en sia vivo donacis ion al Okulmezure. Kiel tiuj iam envenos? Mi estas ege zorgema pri tiuj!

***Ja, vi estis demandanta ion pri tio. Honeste dirite, pri tio mi devas ankoraŭ dormi unu nokton ...***

Kaj jen Jacques staris unusola antaŭ fermita pordo kun la teksto en sia kapo: Ĉe la Dia Moŝto unu tago estas kiel milo da jaroj.

Kaj kun lia granda animo li atendas pacience kun du manoj kiel du pelvetoj antaŭ ĉi tiuj milionoj, kiuj ankoraŭ devas fari donacon, 10-20-100 eŭroj, (tio estas la ĝirnumero de Okulmezure) esperante, ke milo da jaroj por la Dia Moŝto estos unu tago.

Ĉi tiu estas la tago, kiun la Sinjoro kreis kaj al kiu Jacques deziregis alveni, novan ĉielon kaj novan teron.

Kaj se vi ne fidas tion, tiam mi donas al vi la lastan citaĵon el la Lerno-domo (estas teksto de Huub Oosterhuis, kiu aŭdis ĝin de la juda eminenta instruisto Maimonides):

Kio estas skribita pri Dia Moŝto, estu farota de homoj kaj Jacques estas unu de tiuj homoj, kiuj faris tion. Lia memoro estu benita.


*Jan Henneman*
Prezidanto kaj docento
de la Lerno-domo Kennemerland

# Rememoro al Jacques Tuinder



Zienderogen devis adiaŭi sian fondinton kaj pasian pioniron Jacques Tuinder. Homo fajra de pasio. Tre multe plenuminte agojn al siaj proksimuloj kaj precipe al tiuj, kiuj esperas malmulte en ĉi tiu mondo. Pacama batalanto kontraŭ nenecesa blindeco per ĉiuj armiloj, kiujn li povis trovi interne de la okulista mondo kaj ekster de tiu. Esperanto, lingvo kiun li same facile uzis kiel sian gepatran lingvon, malfermis al li multajn pordojn en multaj evoluantaj landoj por efektive ekmovi la manojn.

Mi mem havis la plezuron labori kune kun li en 2010 dum misio en Kongo. La vojaĝo, la varmego, la rezignado pri ĉio, la longaj labortagoj ŝajnis ne influi lin, la 77-jaran nestoron. La "malkovro" de Gloire, preskaŭ blinda knabo ŝajnis doni al li specon da ĝojo, ĉar li povis finance akompani lin pere de Zienderogen. Unu tagon post la "malkovro" oni jam aĉetis uniformon por la knabo kaj oni aranĝis por li lernejon. Komprenu, lernejon por blinduloj. Ni okulmezuris preskaŭ 800 pacientojn dum la misio kaj ili vidis lin nelacigeble staranta en blanka surtuto kun la literkarto en sia mano. Inter la okupoj li provizis la kunlaborantojn de Zienderogen je akvo, kafo aŭ supo. Alia karakteriza aspekto el lia vivo estis lia spiritualeco. Iam, kiam li ne aperis je la interkonsentita loko kaj horo, ni estis enirontaj lian ŝlositan ĉambron, li trankvilanime elvenis el la kapelo ĉar li estis forgesinta la tempon …



Li mortis batalanta laŭdire. Ĵus reveninte el Tanzanio meze de postzorgoj de tia misio montriĝis, ke lia tera tempo estis pasinta. Jesuo diras: "*Mi diras al vi: Kiom vi faris al unu el ĉi tiuj miaj fratoj la plej malgrandaj, tiom vi faris al mi*". Ni certe havas la ideon, ke Jacques bone komprenis tion. Homoj en Albanio, Brazilo, Bulgario, Kongo, Ganao, Hinda Unio, Kameruno, Kenjo, Malio, Maroko, Moldavio, Ukrainio, Osetio, Pollando, Rumanio, Srilanko, Taĝikio kaj Sud-Afriko akiris rigardon al sia futuro per liaj streĉadoj

*Nico Mulder*
La 25an de Junio 2011

# Pri la Evidente-misio en Mwanza

## 02–10 junio 2011

Jayrous Eliaimu-mwanza, Tanzanio

Kara redaktoro de Dia Regno, saluton. Mi petas vin ke vi donu malgrandan parton en via gazeto kaj redaktu mian raporton. Ĝi temas pri la vizito de Evidente-asocio en MWANZA, Tanzanio.



La 2-an de junio vizitis al Mwanza la kvar okulistoj nederlandaj por labori kaj helpi per okul-vitroj al malriĉaj homoj.

La kontakto kaj aranĝoj de la misio estis inter Jayrous Eliakimu kaj Jacques Tuinder, kiu antaŭ nelonge forpasis. Danke al Esperanto per Esperanto la misio sukcesis.

Jacques, noblan homon mi nomas, sendis al mi amason de okulovitroj per poŝto kaj poste venis la okulistoj kiuj donis la servojn de okuloj per mezurado kaj donante la okulvitrojn.

La projekto estis tre granda kaj unuafoje okazis en nia urbo, do la Asocio de Blinduloj en Mwanza skribis invitleteron al Evidente-asocio kaj iĝis gastiganto. Mi informis la regionan estron, la urbestron kaj la urban ĉef-doktoron kaj membron de parlamento pri la alveno de niaj gastoj kaj iliaj servoj al nia societo.

En la flughaveno de Mwanza atendis la gastojn esperantistoj de Mwanza kaj de aliaj najbaraj lokoj, membroj de Asocio de Nevidantoj, sekretario de MP, estro de junularaj organizoj NCDY kaj BED.



Post la alveno ni havis kelkajn minutojn por interkonatiĝo unu kun la alia. Poste ni iris al oficejo de nevidantoj, kie la gastoj ricevis mallongan historion de la Asocio, informon pri la laborprogramoj kaj subskribis gastlibron.

La tuta tago estis por interkonatiĝo kaj prezentado de la gastoj al diversaj registaraj oficejoj.





La sekvantan tagon la servoj komenciĝis. Pli ol 1000 homoj atendis la servojn en la hospitalo de Igombe, 15 km for de la centra urbo. La okulisto laboris senlace. Mi aŭdis multajn homojn demandi ĉu senpage estas la okulo-mezuradoj kaj okulvitroj.

Danke al Esperanto, kiu helpis kaj faciligis la komunikadon, la servoj bone daŭris, homoj ĝojiĝis pro la servoj. Kvar tagojn poste ni laboris en alia parto, Buzuruga hospitalo, kaj en la lernejo de nevidantaj lernejanoj.

La 8-an okazis la adiaŭo kiam finfine la okulistoj kaj reprezentantoj de kelkaj asocioj ricevis la atestilojn, la urbestro dankis la okulistojn pro iliaj bonaj koroj kaj volontuleco.

La 9-an de junio je la 10-a ni akompanis Jacques al la flughaveno, preta por reveni al Nederlando.

La malgajaj informoj venis ke Jacques forpasis la 18-an de junio, ok tagojn post sia reveno al Nederlando. Vere la informo konfuzis la tutan popolon de Mwanza. Precipe al ĉiuj, kiuj renkontis lin dum la misio. Vere ni perdis noblan homon amatan kaj amantan. Amante homojn kaj helpante malriĉajn homojn. En siaj paroladoj li insistis pri paco kaj disvastigo de la Esperanto-movado.



Apude mi enmetas kelkajn fotojn pri la okazaĵoj dum la misio.

Mi deziras al la novaj estraranoj de Evidente bonan laboron.

*Jayrous Eliaimu-mwanza*

# Rememore al Jacques en Taĝikio



Hodiaŭ matene post matena preĝo (19.06.11) mi decidis malfermi retadreson kaj kiel ordinare legis ricevitajn mesaĝojn. Gorga (kunlaboranto de Jacques) mesaĝo iom maltrankviligis min kun nomo Jacques. Malferminte ĝin mi tro malbonhumoriĝis kaj larmoj senŝtopo komencis fali dum kelkaj horoj. Jacques estis por mi pli ol amiko, li estis frato, kiu ĉiam sincere helpis niajn handikapulojn. Ni konatiĝis persone kun li en 2004-a jaro kvankam jam de 2003a jaro ni korespondis. Li batalante kontraŭ nenecesa blindeco helpis al multegaj orfoj, handikapuloj. Li estis por ni idealo kiu inspiris nin per siaj noblaj aferoj. La esencojn de tiuj ĉi vortoj komprenas tiu homo kiu konis lin. Ĉiam kiam li revenadis hejmen el siaj vojaĝoj li sendadis al ni informojn, fotojn aŭ rete aŭ poŝte. Ĉi foje ankaŭ sciinte, ke li revenos la 11-an de junio el Tanzanio, mi ĝuste en tiu tago sendis mesaĝon kaj sciinte, ke li estas tre okupata pri sia laboro, kiun li plenumis sindone, trankvile atendis respondon sed bedaŭrinde respondon mi ne ricevis. Taĝikio havis ŝancon gastigi lin du-foje; en 2004a kaj en 2006a jaroj. Ni ne povas kredi, ke homo kiu sidiĝinte ĉirkaŭ Taĝika "dastarkhano" manĝis kune kun ni, naciajn bongustaĵojn, nun forlasis nin. Jes, vivo havas siajn leĝojn kaj la Kreinto revenigis lin al Sia flanko sen doloro. Li neniam forgesis nin, eĉ en 2008-a jaro nin vizitis liaj "okuloj" = Gorge kaj Joen kaj ni ĉiam restis en reta kontakto. Venas nun al mia memoro niaj paroloj, lia doloro estis homara mizero.

Jalaliddin Rumi kiam renkontiĝis kun sia patro kun Faridadin Attar, havis 5 jarojn kaj ne konis lin, kaj bedaŭris la mondon, ke ĝi havas tiom da mizeraj homoj sed post kelkaj minutoj, kiam eksciis, kiu estas Rumi, skribis en siaj memoraĵoj kaj bedaŭris, ke baldaŭ la mondo perdos sian perlon (Attar estis maljuna).

Do, nun la mondo perdis alian sian perlon.

Mi kara frato, via muslima frateto kun miaj gefamilianoj, preĝas por vi, ke Allah ĉirkaŭbrakumi vin ame kaj protektu en la danĝerega vojaĝo, ĝis la promesita Paradizo.

Estu en Paco kaj Protekto, Amin.

Sincere, fratete, elkore

Viaj el Taĝikio



En la kongressemajno ni pensis pri Jacqes kaj Vera. Ĉe la kongresa tabulo ni alfiŝis la foton kaj la mortanoncon. Kaj ni havis memorigan diservon, en kiu la foto kun Jacques estis videbla sur ekrano. Philippe prelegis pri la biografio, mi legis la aldonitan nekrologon pri la bonhumoro de Jacques kaj ni kantis kelkajn de Jacques tradukitaj kantoj el ADORU. Do preskaŭ neniu tago sen Jacques.

Por mi Jacques estis unika frato, per kiu mi spirite kreskegis. Kongresi kun li kaj la edzino estis ĉiam pliriĉiĝo. Pro Evidente ni havis multajn kontaktojn, speciale pro la monĝirado. Ni nun ĝiros al Stichting Zienderogen (la nomo Evidente malaperis) 445 EUR (el la du kongresaj diservoj, de la brita KELI-sekcio kaj donaco).

*Siegfried*



Kun doloro mi eksciis pri la forpaso de Jacques. Li estis nobla homo kun ekumena koro. Por kompreni la fakton, ke en siaj lastaj 40 vivojaroj li dediĉis sian energion pli al KELI ol al IKUE, oni povas legi artikolon el Espero Katolika el 1971: http://www.facebook.com/l/5cdca/www.esperokatolika.org/ek19711975/ek1971_0203.htm%236 La bazo de tiu ĉi artikolo daŭre estas mirige aktuala, sed bonŝance en IKUE ni nuntempe ne inklinas al skismoj. Kontraste kun Carlo, mi neniam sentis emon malkonsenti kun Jacques, sed ŝatis eĉ liajn ideojn por superi la disigon inter la diversaj kristanaj konfesioj. Plej admirinda restas lia bonfara agado. Kun ioma doloro mi foje havas la impreson, ke tiu temo ne aparte gravas por katolikaj esperantistoj. Ĝuste danke al li, karitato (aŭ eĉ demandoj pri evolua politiko, homaj rajtoj ktp.) ne malofte ludis rolon sur la paĝoj de DIA REGNO, dum aliloke (ekzemple en raportoj pri katolikaj Esperanto-aranĝoj) tiaj temoj apenaŭ menciiĝis. Mi timas, ke post la forpaso de Jacques bedaŭrinde neniu kristana esperantisto daŭrigos lian agadon por E-vid-ente, almenaŭ ne kun sama energio. Tamen lia modela agado konstante memorigu nin pri tio, ke bonfarado nepre estu io esenca por kristanoj kaj nelaste ankaŭ por kristanaj esperantistoj.

Amike kaj funebre
*Ulrich*

D-ro Ulrich Matthias,
IKUE-ano kaj
dumviva membro de KELI



Surrete, en soc.culture.esperanto mi aperigis jenan mesaĝon: *Forpaso de granda esperantisto. En la nokto inter la 18a kaj la 19a de junio forpasis pro koratako JACQUES TUINDER, dum jaroj prezidanto de IKUE kaj poste de KELI, iniciatinto kaj motoro de bonfara agado Evidente. por blinduloj. Mi priploras la perdon de amiko kaj sincera persono, kun kiu ofte ne estis interkonsento pri specifaj temoj, sed kun kiu ĉefe ĉiam estis granda amikeco kaj admiro. Por ni kristanoj, estas plia anĝelo en la ĉielo por ni.*

*Carlo Sarandrea*

Rapide venis jena reago:

Sincerajn kondolencojn al vi, Carlo, kiu perdas amikon, al liaj amikoj, al liaj familianoj. Tia homo vekas nian admiron kaj de nun kaj poreterne li stele scintilos en la firmaĵo de Dio.

Korajn pensojn, Mireja

Mi estas malgaja.
*Carlo*

---

Ni estis ege malfeliĉaj kiam ni aŭdis pri la forpaso de "S-ro Evidente" kia brila, fidela viro!

*Jean kaj David Bisset*

---

Kara Siegfried, frapis mian koron via sciigo, kaj miaj hodiaŭaj preĝoj estos tutkore por la animo de nia karmemora Jacques.

Frate *Rodolfo*

---

La rumaniaj esperantistoj ege ploras pro la forpaso de eminenta esperantisto kaj la plej vera amiko sinjoro Jacques Tuinder ne trovante vortojn por esprimi la grandan malplenecon en Esperanto-movado kaj Evidente kaj malĝojon en niaj koroj kion lasis lia malapero.

Ripozu en paco!

Ni sincere kondolencas la familion.

*Maria Laszlo* kaj la IKUE-reprezentanto *Ioan Weisz*

# Mallonga biografio de Jacques Tuinder

Ĉerpita el IKUE-ttt-paĝo

Jacques estis lia voknomo, plene li nomiĝis Jacobus Antonius; li naskiĝis la 10.01.1933 en Hago. Liaj gepatroj estis benitaj per ne malpli ol 10 infanoj. Li studis teologion kaj sociologion kaj iom antaŭ la elekto al prezidanteco de IKUE, la tiam 33-jaraĝa Jacques estis ĵus fininta siajn studojn kaj laboris en la sociala fako de sia diocezo.

En 1951 li konatiĝis kun Esperanto per artikolo pri la katolika E-movado en eklezia gazeto. Aŭtodidakte li lernis la lingvon. Dum la jaroj 1957/58 li redaktis la rubrikon "Tra la katolika mondo" en ESPERO KATOLIKA (EK), poste dum du jaroj la gazeton BIRDO. En 1962/63 li estis prezidanto de "Nederlanda Katoliko" kaj redaktis ties organon.

Li edziĝis al esperantistino, flegistino kaj lia kursanino, kiun li renkontis la unuan fojon dum la UK en Varsovio (1959). Ili havis 3 filojn. Elektita prezidanto dum la IKUE-kongreso en St. Gallen 1966, lia prezidanteco karakteriziĝis ĉefe per la ekumena elano: kulmino estis la Unua komuna Kongreso de IKUE kaj KELI, okazinta de la 25a de julio ĝis la unua de aŭgusto 1968 en Limburg/Lahn, kun la partopreno de 200 esperantistoj, membroj de la du kristanaj asocioj, el 18 landoj. Ĝi estis la unua el tiuj, kiujn oni nun nomas Ekumenaj E-Kongresoj.



Jacques kaj Vera

Je la balotoj de 1971 li ne estis reelektita kiel prezidanto de IKUE. En la postaj jaroj ĝis sia forpaso li streĉe sin dediĉis al bonfaraj agadoj (tre fama estas lia porblindula agado, konata sub la siglo Agado E 3, aŭ nun E-vid-ente).

En 2000 li estis elektita prezidanto de KELI ĝis 2003. Poste li daŭre restis estrarano en KELI. Li vivis en Heemskerk kun sia edzino Vera Tuinder Dekker.

La reĝino de Nederlando honoris lin per "Kavaliero de la ordeno de Orange-Nassaŭ" pro helpo al blinduloj kaj malbonvidantoj pere de Esperanto.

[En Dia Regno 2/2006, Jacques Tuinder rakontas pri si mem sur la paĝo "la profilo" / Red]

# Letero al ‘Evidente’-apogantoj

Heemskerk, januaro 2011

Jacques TUINDER, NL

Tiun ĉi informleteron Jacques Tuinder sendis en januaro 2011 al la interesuloj/apogantoj de Stichting Zienderogen. Valoras ankoraŭfoje legi ĝin. /Redaktoro

Karaj geamikoj. Homo dankema mi estas, ke kune kun edzino Vera, miaj gefiloj kaj genepoj mi elaste kaj esperplene transiris la sojlon al la nova jaro. Ĵus mi atingis la aĝon de 78 jaroj, el kiuj pli ol 44 mi plenenergie kaj sindediĉe klopodis batali kontraŭ nenecesa vidhandikapeco, kaj solidarece kaj amikece servi al homoj grandaj kaj malgrandaj kun okul-problemoj. Por tiuj kiuj interesiĝas pri statistiko: ĉiperiode ni laboris/laboras en 27 Iandoj!

En junio kaj julio de la pasinta jaro mi travivis periodon de serioza malsano; mi opiniis ke la ĉielo intencas voki min, sed ĝi 'evidente' ŝanĝis sian eble ne ĝustan decidon... Sed certas, ke iam



Jacques Tuinder en sia hejma oficejo

sonos la lasta vokvoĉo.

Mi pripensis la tutan aferon kaj kreskis mem al la decido: jam venas la tempo por transdoni parton de miaj taskoj kaj devoj al alia(j). Jes, multo ŝanĝiĝos en la estonteco, ĉar neniu estrarano scipovas Esperanton kaj neniu majstras la brajlon. Provizore mi pritraktos tiujn aferojn. Ekzemple, mi antaŭ kelke da tagoj ricevis peton de samideano en Tanzanio, kiu aŭdis pri nia laboro en Afrikaj kaj aliaj landoj: 'venu ankaŭ al ni, en Mvanzo, kie promeneto 30-metra jam sufiĉas por renkonti homon kun vidhandikapo!' Mi korespondas kun esperantistoj en Novoĉerkasko (Rusio), kaj verŝajne ankaŭ tio kondukos al misio ĉijare. Ĉiam necesas oficiala invito flanke de Asocio de Nevidantoj aŭ Instituto por Infanoj Vidhandikapitaj, kaj tiam la korespondado povos kompreneble okazi en iu ajn t.n. 'moderna lingvo'. Mi atendas ankaŭ trian mision al Kaliningrado, kie mi estis en novembro pasinta kun okulisto kaj tri optikistoj. Mia espero ankaŭ flustras, ke ni povos aranĝi duan mision al Kongolando kun pli da okulistoj kaj optikistoj, pro tio ke terure granda en tiu lando estas manko de okulspecialistoj.

Karaj amikoj, mi tre esperas daŭrigi la brajlo-skriban korespondadon kun kelkdeko da blinduloj kaj surd-blinduloj, precipe en Esperanto. Mi intencas ankaŭ verkadi artikolojn por porblindulaj revuoj. Restas sufiĉe da taskoj, inter tiuj la sendado de (revendejaj kaj aliaj) bezonaĵoj al unuopuloj kaj institutoj en ekonomie malfortaj landoj.

La programo mencias, ke ni instalos Optikan Centron kaj en Ukrainio kaj en Maŭritanio. En minimume tri Afrikaj landoj (Kongo. Maroko, Maŭritanio) ni esperas esence helpi al porblindulaj lernejoj per plibonigo de 'la tegmento' (unualoke ankaŭ la 'internulejo') kaj plialtigo de instru-nivelo. Vere mi ĝojas pri helpantaj manoj de modesta rondo de samideanoj, kiuj ofte helpas al la realigo de niaj projektoj. La lastajn semajnojn ni ricevis apogon el Germanio. Nederlardo, Pollando kaj Rusa Federacio. Koran dankon!

Nepre ni daŭrigu helpon al ĉiuj niaj finance adoptitaj infanoj en Kongo, Maŭritanio, Maroko kaj Rumanio.

> Vere mi ĝojas pri helpantaj manoj de modesta rondo de samideanoj, kiuj ofte helpas al la realigo de niaj projektoj.

Nu, mia espero estas granda ke la kelkdekpersona grupo da volontuloj, kiuj aktivas 'sur la kampo', liveros unu aŭ plurajn 'heroojn', kiuj transprenos mian centran motorfunkcion de iniciemo kaj kunordigado, monpetado kaj korespondado. Mi ĝojas ke ĉiam mi havis bonegan ligilon kun ĉirkaŭ 500 miaj helpantoj, ĉefe nederlandaj kaj ĉefe neesperantistaj.

Al vi ĉiuj mi sendas por la unua aŭ dua fojo novjarajn bondezirojn kaj elkorajn, dankoplenajn salutojn, ankaŭ nome de Vera kaj la estraro.

El Dia Regno
Numero 6/2007

# Ĉu Esperantistoj Esperigas Esperantojn?

Prelego verkita de Jacques TUINDER, NL,
por la Ekumena Kongreso 2007 en Pelplin,

prezentita de Siegfried KRÜGER, DE

Karaj gefratoj, en la jaro 1966 nia samideano **Jacques Tuinder**, ĝisosta KELI-ano kaj dumviva membro de IKUE (profesie li estas social-helpisto) por la unua fojo aŭdis pri la giganta problemo de nenecesa blindeco en grandaj partoj de la mondo. Tiutempe oni parolis pri ĉirkaŭ 15 milionoj da blinduloj, el kiuj tri el kvar estas tute nenecese vidhandikapitaj. Ilia blindeco ĉu preventeblas, ĉu kuraceblas. Li konsideris tion grava kulpigo kontraŭ nia tiel nomata civilizita sed tiukampe blindega mondo.

Jacques konatiĝis kun Fondaĵo portanta la nomon de fama oftalmologo, prof. d-ro H.J.M. Weve; dum multaj jaroj li estis ne senmerita ĝia estrarano. Tiu fondaĵo iniciatis projektojn en orient-afrikaj landoj. Prezentiĝis la eblo finance 'adopti' i.a. kataraktulojn per sponsorado de simbola pago de du aŭ tri nederlandaj guldenoj.

Jacques kaj lia edzino Vera – ili ekkonis unu la alian kadre de la Universala Kongreso de Esperanto, en 1959 okazinta en Varsovio (Pollando) – decidis partopreni tiun agadon, ĉar ĝi ebligis redoni lumon al multe da homoj, esperantaj ekvidi aŭ pli akre vidi. Unualoke la atento direktiĝis al Kenjo, kie Jacques havis helporilaton kun la ĵus komenciĝinta blindulejo en Aluor, instituto kun 65 vidhandikapitaj infanoj.

Kiam okulisto en 1965 vizitis tiun lernejon, li konstatis ke supozeble 17 infanoj (= pli ol 20%) estas operacieblaj…

Kiam la okuloj de Jacques vaste malfermiĝis antaŭ **la mondvasta tragedio de evitebla blindeco**, temis – mi jam diris – pri 15 milionoj da blinduloj, sed post 40 jaroj – malgraŭ ĉiuj fortostreĉoj de multegaj organizaĵoj kaj agadgrupoj – la nombro eĉ triobliĝis.

Nune inter kvardek kaj kvindek milionoj da homoj – mankas, komprenble, fidindaj statistikoj – ne vidas la miraklon de la ĉiutaga sunleviĝo, ĉar ili ne havas aliron al okulspecialisto. Kaj mi ne parolas pri la amasegoj da malforte vidantaj homoj kiuj urĝe bezonas okulvitrojn.

Jacques decidis gajni parencojn, geamikojn, najbarojn kaj kolegojn ktp por

la ideo pagi almenaŭ unu okuloperacion. Kaj multaj spontane reagis kaj konsentis. Poste li, pripensante la aferon, venis al la konkludo, ke estus bonega penso direkti sin al la esperantistaro, ĉar 'nia diligenta kolegaro' parolas kaj propagandas lingvon, kiun donacis al ni okulisto. Kaj tiu okulisto estis ne nur aŭtoro de internacia komunikilo, kiun ni ĉiutage uzas, sed li ligis kun sia lingvo idealon kaj ideon. Ĉiu esperantisto profunde konscias pri tio, ke por d-ro Zamenhof tiu 'interna ideo' estis ege esenca. Kaj iom post iom Jacques kreskis al la decido turni sin al siaj samideanoj. Tio okazis en novembro 1966, kiam li alvokis la legantojn de *Espero Katolika* 'esperigi esperantojn'.

La demando estis: ĉu eblas – laŭ la spirito de d-ro Zamenhof – tre konkrete eksterigi la internan ideon de Esperanto? Kaj tiel naskiĝis la nomo de agado, kiu ekzistis dudek kvin jarojn, t.e. *Agado E3: "Esperantistoj Esperigas Esperantojn"*. La tiama espero de Jacques estis, ke 'Uzantoj de Lingvo de Espero' – kaj nelaste tiuj, kiuj aŭdas en la oreloj la vortojn de Jesuo ('Mi estis blinda kaj vi redonis al Mi vidpovon') – certe kaj amase donos esperon al tiuj el ni kiuj esperas vidi lumon. Ĉiam li esperis, ke per ĉi tiu agado li servos samtempe kaj al la sorto de vidhandikapuloj kaj al la disvastigo de nia kara lingvo.

En 1968 okazis la unua komuna kongreso de IKUE kaj KELI. Eble kelkaj el vi memoras, ke la ĉeestintaro tiam akceptis – laŭ iniciato de Stefan Maul – rezolucion, kiu

*"konstatis, ke Agado E 3 meritas subtenon de ĉiu esperantisto, kiu laŭ ekzemplo kaj spirito de la kreinto de Esperanto, d-ro L.L. Zamenhof, volas mildigi la suferojn de blindaj homoj; deklaris tial Agadon E 3 afero de la tuta esperantistaro (...); esperis, ke konkreta kunlaboro inter IKUE kaj KELI kondukos ankaŭ al aliaj formoj de frata kunlaboro kaj komuna agado laŭ la spirito de la kristanismo"*.

Ĝis la hodiaŭa tago ĉi tiu rezolucio, bedaŭrinde, restis ne multe pli ol papera, senefika afero...

Tiel Jacques staris antaŭ duobla tasko: unue malfermi okulojn de la esperantistaro por ke malfermiĝu okuloj de malproksimaj homoj, foraj ankaŭ de okulspecialistoj. Li ekde la komenco tute ne havis la intencon fondi organizaĵon. Li deziris esti kaj resti privata persono, unuopulo kun multe da kromaj manoj kaj piedoj. Li volis fari ĉiun laboron je propra poŝo kaj en siaj liberaj horoj. Kaj tio restis la formulo ĝisnuna: ĉiuj subvencioj kaj mondonacoj centprocente fluas al la bonaj celoj, dum la ne-projektligitaj kostoj estas la zorgo de la iniciatinto.

Ĉiujare du personoj, prefere el rondoj de grandaj sponsoroj (Sovaĝaj Anseroj, Ministerio de Eksterlandaj Aferoj, komunumo Heemskerk, ekleziaj komunumoj, monaĥejoj, revendejoj, servo-kluboj, k.s.) kontrolas la librojn de la fondaĵo. Se iu postulas revizoran raporton, li aŭ ŝi pretu pagi la kostojn.

Ade kaj ade montriĝis, ke la nomo de la Internacia Agadgrupo ne adekvatas,

ne taŭgas, ĉar la plej granda parto de la esperigantoj jes havas malfermitajn okulojn sed ne parolas Esperanton. Lasinte periodon dudek kvinjaran malantaŭ si, Jacques duonigis la duoblan taskon – unuflanke malfermi esperantistajn vidantajn okulojn kaj aliflanke nenecese vidhandikapitajn okulojn – ĉar tiu laborego estis superhome peza. Li perdis tro da tempo, energio kaj mono, kiujn li prefere utiligu por la dua kategorio, kiun li deziris helpi. Post dudek kvinjara agado li ŝanĝis la nomon de la Agado en **'Aktie zi-e-nd-e-rog-e-n'** (internacilingve: "E-vid-E-nt-E")**.** En 1997 la Agadgrupo fariĝis jura persono (fondaĵo) kun oficiala registrigo en Ĉambro de Komerco. Sekretario fariĝis Cor Dekker (konstru-specialisto) kaj kasisto Daan Simoons, impostsciencisto. En 1991 Jacques turnis sin al la esperantistaro por serĉi personon, kiu transprenu lian unuan taskon, t.e. disheroldi la mesaĝon ke tri el kvar blinduloj povus vidi, se... 'Evidente' komencis agadi sub la kerneca latinaĵo *"Videantur ut videant"*. Tio signifas: Ke ni – esperantistoj kaj neesperantistoj – ekvidu blindan kunhomon en fora lando, por ke li aŭ ŝi vidu: foje denove, foje pli akre! Bedaŭrinde ĝis nun tiu krianta heroldo en nia verdstela dezerto ne anoncis sin. Jacques restis la ĉefa kaj plene responsa motoro de la afero, iniciatanta, informanta, monpetanta, dankanta, plenumanta, vojaĝanta.

Bela, kortuŝa periodo estis la tempo de la 'mola valuto', la tagoj de la komunismo. Multaj homoj en mez- kaj orient-eŭropaj landoj emis tiam subteni la porblindulajn projektojn, sed ne povis sendi monon. La sekvo estis, ke ĉiutage – kvazaŭ bombarde – invadis la hejmon de familio Tuinder pakaĵoj enhavantaj folklore vestitajn pupojn, gramofondiskojn, librojn, skulptaĵojn, k.s. Tio estis laciga, multan energion formanĝanta, temporaba laboro: en variaj lokoj kaj ĉe diversaj okazoj li devis peti al la nederlanda publiko: "*Sinjorino/ sinjoro, ĉu vi pretas ebligi al oferema homo en nepagipova lando, al Polo aŭ Ĉeĥo aŭ Hungaro, iom kontribui al la batalo kontraŭ la nenecesa blindeco?"*

Preskaŭ ĉiam li devis pacience-elokvente ekspliki, kio povus esti la mistera, magia rilato inter pupoj kaj blinduloj... Kiam falis muroj kaj malaperis kurtenoj, tiu karakteriza helpado komplete finiĝis, tiu fonto de enspezoj tute sekiĝis. Restis nur unu aŭ du fidelaj kontaktoj.

En la daŭro de la tempo 'Evidente' fariĝis vasta, konstante kreskanta grupo de okulistoj, optikistoj, fakinstruistoj, rekapabligo-specialistoj, brajlopresistoj, arkitektoj ktp. Ĉiuj estas volontuloj; neniu ricevas salajron. 99% el la sponsoroj loĝas en Nederlando kaj escepte de kelkaj esceptoj ĉiuj parolas Lingvon de Esperanto, kvankam ne la Zamenhofan. Por eviti miskomprenojn: dum pli ol kvardek jaroj Jacques neniam malpermesis al esperantistoj kontribui brike aŭ mem iniciati kampanjon aŭdace kaj entuziasme. La ideo estas tiel simpla, sed ne trovas idealistojn: serĉi okuliston aŭ optikiston kaj vojaĝi al lando kie amase abundas 'esperantoj'. Komprenèble 'Evidente' volonte disponigas la

necesan instrumentaron.

Rilate al la preskaŭ senlima kampo de projektoj mi raportu la jenon:

**Ĝis nun 'Evidente' havis / havas projektojn en 23 landoj**. Ofte Esperanto ludas rolon en tiu senco, ke ĝi malfermis la pordon al laborloko.

Kiam en iu lando Jacques havas renkontiĝon kun esperantistoj, li kutime diras:

> "sen Esperanto mi ne estus ĉi tie!" kaj "mi klopodas fari ĉi tiun taskon laŭ la spirito de lingvisto-okulisto Zamenhof kaj instruisto-kuracisto Jesuo!"

Preskaŭ ĉiam esperantisto estas kontaktpersono faranta programon, gvidanta al instancoj kaj interpretanta kiel ponto inter lingvoj – alimaniere ne eblas.

La unuaj projektoj de la kampanjo estis: kolekti monon por sendi surradajn okulklinikojn al Kenjo kaj Malavio. Cetere, en Kenjo Agado E 3 konstruis simplan dometon por oftalmologia flegistino.

Sekvis en Kamerunio la konstruado de kvardek-lita okulkliniko kun propra operacia ĉambro por la okulisto. Temis pri okulisto, sendita flanke de la Reformita Eklezio. Li laboris ok jarojn en tiu lando.

Poste komenciĝis forta apogo al Optikejo New Look en Ganao, kiun gvidis kaj ankoraŭ fone akompanas la nederlanda misiisto Zef Cramers. La fondaĵo ĉefe helpis per instruado, per ilaro, monsumoj kaj okulvitroj.

Al Jacques plaĉis subteni ĝuste tiujn personojn en foraj landoj, kiuj devas fari la laboron per malplenaj manoj aŭ nesufiĉo da kono. Grava celo de 'Evidente' estas: instrumentumi ilin scie kaj ile. Tiel 'Evidente' servis al du okulistoj en Hindio kaj unu okulisto en Suda Afriko per oftalmologiaj instrumentoj.

En la daŭro de la jaroj 'Evidente' invitis pacientojn el Pollando, Albanio kaj Bulgario por okuloperacio en okcidenta Eŭropo.

Karaj, la kanto, kiun ROS' Haruo verkis antaŭ dek jaroj memore al la 11-a septembro, troviĝas en KRISTANAJ FONTOJ:
http://web2py.dli-info.net/urban/es/download?d=ek_02.pdf
http://web2py.dli-info.net/urban/es/download?d=ek_02.mid

Antaŭe vi devas ensaluti (informo troviĝas sur la ttt-paĝo). La piano-aranĝo de Ernst LEUZE:
http://web2py.dli-info.net/urban/static/ek/ek_piano_02.pdf
http://web2py.dli-info.net/urban/static/ek/ek_piano_02.mid

Dio benu vin!
*Albrecht Kronenberger*

# La militista viruso...

## montriĝas evidenta danĝero por la publika sano!

Laŭ pamfleto, cirkulanta en Hispanujo, prilaboris Jacques TUINDER

Mi – por tiel diri: bonŝance – ekrenkontis dum miaj esploroj grandan, riskoplenan danĝeron: porpacaj specialistoj, fakuloj sur la kampo de popola sano, min kaj ĉiujn kiuj havas akrajn orelojn, konsilas ke ni, se ni ne volas infekciiĝi per Deterritus Cerebrorum, kiun kaŭzas la viruso, zorgu ke ni ne fariĝu viktimoj de la militista hierarkio. Militestroj ĝin senprobleme reklamu taŭga, aventurriĉa kaj humana , sed ĝi estas evidenta enfalujo en kiu, sub alta protektado de ŝtataj leĝoj, disvolviĝas kruela perforto kaj blinda obeemo.

Ĉe tio oni submetiĝas al absurdaj ordonoj kaj dissendiĝas al lokoj, al kiuj oni neniam kutimiĝas, kaj kun la nura celo mortigi kunhomojn. La aŭtoritatuloj simple predikas ke ili estas viaj malamikoj, inter kiuj ankaŭ ĉarmaj infanoj. Tio eufemisme nomiĝas 'kroma damaĝo'.

Ĉi tiu viruso estas tre kontaĝa kaj jam ruinigis la vivon de sennombraj gejunuloj

Ĉie en la mondo kaj dum la tuta homa historio la viruso montris sian mortigan karakteron. Ne pasas semajno, en kiu ni ne aŭdas novaĵojn pri civitanoj kiujn viktimigis tiutipaj virusoj. Ni konas neniun militon, malantaŭ kiu ne kaŝiĝas ekonomiaj interesoj kiuj kundependas kun la interesoj de la reganta socio-tavolo (oleo!), nek 'human-intencan agadon', kiu ne alportas murdojn kaj sisteman malobservadon de homaj rajtoj. Kaj tion ni devas pagi pere de ŝtataj monrimedoj, kiuj multe superas la buĝeton ekz. por instruado kaj edukado. Ĉi tiu viruso estas tial tiom danĝera ke ĝi klopodas aspekti senkulpe afabla, ĉar ĝi kaŝas sian mortigan venenon malantaŭ belaj vortoj kiel humaneco, demokratio, paco kaj libereco.

**Ĉefaj simptomoj de la virusa infekcio**

- Mensa narkozado kiu finfine pensigas homojn ke milito kaj paco estas sama afero. Kaj ne nur tio. Ankaŭ ke invadado, detruado kaj okupado de lando okazas pro ĝia propra bono kaj celas noble redoni la liberecon al ĝiaj civitanoj.
- Plena perdiĝo de la kritikema kapablo kaj videbliĝo de inklinoj de kompleta submetiĝo kaj blinda obeemo. Kiom ajn absurdaj estu la ordonoj, oni senpripense respektas kaj perfekte plenumas ilin. Cetere, al militista disciplino mankas ĉia

kohereco.

- Alta patriotisma febro kun ŝvelaĵoj de fremdofobio, rasismo kaj vir-vireco. Per tio oni ĉiam preferos la koloron de la propra blanka haŭto kaj malŝatas la nigran aŭ kiun ajn haŭtkoloron de aliaj homoj. Nu, tia ja estas la armeo: ĝiaj estroj instruos al vi la senkondiĉan neceson nepre defendi nin mem kontraŭ fikciaj kontraŭuloj, kiuj estu Ĉinoj, Araboj aŭ eĉ Marso-loĝantoj.
- Vi ordonos al homoj fari terurajn kaosaĵojn kaj vi rifuzos aŭskulti ĉiun personon kun malsama opinio, sinteno inda al ĉiu faŝisto. En la armeo oni forkonsumos vian cerbon, kiel tio okazas ankaŭ en sektoj; vi simple devas pensi kiel armeestroj volas kaj diktas!
- Naskiĝas unu post la alia paranojaj kaj agresivaj inklinoj, vidi ĉiam kaj ĉie atakemajn malamikojn kaj danĝerajn fremdulojn.

Se kontaĝis vin ĉi tiu viruso kaj vi opinias ke vi bezonas resanigan terapion aŭ humur-humanan helpon, tuj kontaktu membrojn de la porpaca movado; ili zorgos pri tio, ke vi kuraciĝu al persono kun propraj kritikemaj kaj homaj kapabloj kaj ne forglitu al suferonta viktimo... Konklude, elektu vian propran estontecon: aŭ silenti kaj obei, aŭ – alternative – mem pensi kaj agi!

☙

## Poezio

Antaŭhieraŭ estis milito
ankaŭ hieraŭ
kaj ankoraŭ ĉiam
en mia hodiaŭo
estanta ne nur mia

Mono ade ŝteliras
ĉirkaŭ la mondo
pagas sin mem
militmaniere

ne al milito permesu
porti ĝian nomon
ĝi nomas sin
simple defendo

Poezio estas la arbustaĵo
en kiu mi min kaŝos
kiam venos la soldatoj
en siaj tankoj tintantaj

Remco Campert
tradukis: Jacques Tuinder

Remco Campert (1929- ) estas nederlanda poeto kaj aŭtoro

# informoj

## Evidente
## – monkolektado 1

Laŭtradicie dum la Ekumena Diservo en la Kopenhaga UK, kiun laŭ liturgio de Taizé gvidis luterana pastoro Leif Nordenstorm,  katolika pastro Peter Knauer kaj remonstranta pastoro Gerrit Berveling, okazis monkolektado por la konata agado Evidente, iniciatita de Jacques Tuinder por blinduloj, vidhandikapuloj k.s. Kvankam li mem pasintan junion mortis, lia agado feliĉe estas daŭrigata.

La koncerna monkolektado sumigis 1600,50 danajn kronojn = € 214,85 + en eŭroj € 110,--. Tio estas kune € 324,85.

La monon al agado Evidente mi transpagos.

*Gerrit Berveling*

## – monkolektado 2

Dum la KELI-kongreso en Poděbrady okazis monkolektadon dum du diservoj je la sumo de € 285. Krome alvenis donacoj de i.a. la brita KELI-sekcio. Entute estis ĝirata € 445.

Salutas *Siegfried*

## – dankesprimon

Karaj, mi ricevis retmesaĝon de Stichting Zienderogen (antaŭe ankaŭ Evidente) kun dankesprimo pro la mondanacoj.

*Els van Dijk*

## – daŭra apogo

Ni daŭre apogos la agadon. Kolektitaj mondonacoj kiuj alvenos al KELI, dum diservoj, rektaj pagoj aŭ alimeniere ricevitaj, ni daŭre transferos al la Stichting Zienderogen.

*KELI-estraro*





Ni tre bedaŭras ke S-ino Preston mortis, ŝi estis tre fidela membro dum multege da jaroj.

*Jean Bisset*



Karaj, nur malmultaj el vi renkontis la pastoron Alain Martin, teologo kaj fakulo pri la aramea lingvo. Li estis dum multaj jaroj prezidanto de la franca sekcio de KELI. Li estis membro de la Grupo de Dombes.

Li forpasis antaŭ nelonge dum kirurga operacio.

*Philippe Cousson*
Poitiers

Ĉi jare la Brita Kongresa Diservo estis estrita de S-ino Frances Eason kiu estas Savarmea oficiro kaj bona grupo partoprenis.

La Skota Kongresa Diservo okazis en la urbo Lockerbie en sud Skotlando, ĝi estis la loko kie okazis la terura flugkatastrofo, la temo por la Diservo estis "Pardonemo"

5 homoj partoprenis !

Ni bedaŭras ke ni ne povos iri ankaŭ al la Keli Kongreso, sed oni ne povas fari ĉion. Ni sendas bondezirojn por ĝuinda, suksesa kaj pacoplena kongreso.

Bondezirojn,
*Jean Bisset kaj ankaŭ Davido*

# Kristo havas ne aliajn **manojn** ....

Kristo havas ne aliajn **manojn** ol manojn de homoj
por fari sian laboron ĉi tie surtere.

Li havas ne aliajn **piedojn** ol piedojn de homoj
Por gvidi homojn sur siajn vojojn.

Li havas ne aliajn **lipojn** ol lipojn de homoj
por rakonti al homoj pri siaj naskiĝo,
morto kaj releviĝo.

Li havas ne alian **helpon** ol nian helpon
por gvidi homojn al sia flanko.

Ni estas la nura **biblio**,
kiun la mondo ankoraŭ legas.

Ni estas por pekuloj la **Evangelio**,
por la mokemuloj la **kredkonfeso**.

Ni estas la **lasta komuniko de Dio**
skribita, per vortoj kaj faroj.